

# Kien kreski en Esperantujo?

Hans Fechner

Eble vi demandas vin, kiu metis tiun Hans Fechner sur tiun ĉi lokon ĉi tie. En la jaro 2005 mi faris prelegon en la Hamburga Esperanto-grupo pri la temo «Kiel vivi interurban partneran interrilaton?» Kaj post tiu prelego Jürgen Wulff invitis min, fari kontribuon ankaŭ dum tiu ĉi nuna kongreso. Do mi staras ĉi tie.

Ke mi elektis tiun ĉi temon, tio havas plurajn kaŭzojn. Certe, la titolo spegulas la kongresan temon. Sed al la en ĝi vivantaj – eble provokaj - demandoj kondukis min miaj spertoj en Esperantujo. Mi observas konfuzan miksaĵon, kiu konsistas unuflanke el senhelpeco, senkuraĝo, pesimismo kaj aliaflanke el firma, senzorga rigardo en bonan estontecon. Do mia demando: En kia rilato kaj en kiun direkton ni povus kreski? Mi diros al vi, kiujn respondojn mi trovis por mi mem. Tio signifas, ke mi prezentos al vi nur mian – por tiel diri – ‘propran rakonton’ – kaj mi invitas vin, kompari ĝin kun viaj propraj spertoj kaj rakontoj.

## Konfuza situacio

Unue mi skizos kelkajn por mi konfuzajn spertojn.

1. En Esperanto aktuelle (dua kajero 2006) Werner Pfennig demandas “Ĉu Esperanto atingis sian finon?” (Ist Esperanto am Ende?). Li parolas pri radikala interna ŝanĝiĝo de la Esperanto-movado – tiom grava kiom neniam antaŭe. Pesimistoj kredas, ke Esperanto atendus sian morton. Kaj W. Pfennig priplendas tendencon de retiriĝo de geamikoj, kiuj tamen kontinuas uzi Esperanton, sed rifuzas la kontakton al la asocio. Kaj li demandas, kiel oni povus ŝanĝi ilian paroladon senkuraĝon denove al ĝojo pri Esperanto. Kaj laŭvorte: “Kaj ankau ni, la praktikantaj lingvoamikoj ne vere scias, kiel nia ideo realiĝos kaj ĉu Esperanto havos en ne tro fora tempo iun estontecon.” (Ea 2/2006, p.11)

2. En la sama kajero Alfred Schubert komentas la de Werner Pfennig donitan pritakson de la situacio. Li konsentas, ke fakte multaj asocioj kaj kluboj plendas ĉiam denove pri foriĝantaj membroj. Li parolas – same kiel Pfennig – pri grandaj ŝanĝiĝoj, tra kiuj iras la Esperanto-movado. Tamen li estas konvinkita, ke tiuj ĉi ŝanĝiĝoj kondukos nin al nova Esperanto-kulturo. En nia nuna tempo preskaŭ neniu membriĝas en asocio, “por servi al iuj altaj idealoj”, sed nur se tia membriĝo havas valoron por li / ŝi mem.

“Multaj el ili ne havas intereson je ‘Movado’, sed volas utiligi sian tempon por io pli bona. Sed kio estas tiu ‘pli bona’, tion ili decidas mem.” El tiu ĉi nova generacio de Esperanto-parolantoj evoluas – laŭ Schubert – nova Esperanto-kulturo, kiu konsistas en tio, uzi Esperanton por propraj celoj. “Hodiaŭtempe multaj Esperanto-parolantoj volas pasigi sian liberon tempon kun homoj kun samaj ideoj kaj celoj, sed ne partopreni en la disvastigo de la lingvo. Ĉi tiu nova generacio estas la estonto de Esperanto... Esperanto ne atingis sian finon, sed sian komenciĝon.” (Ea 2/2006, p.3)

Jam en la unua kajero de 2006 Alfred Schubert montras grandan optimismon rilate al la ŝancoj de estontaj ŝanĝiĝoj. “Esperanto ne plu ekzistas kiel movado, sed la movado fariĝis parto de vasta komunumo, en kiu plej diversaj homoj kaj plej diversaj organizaĵoj volas atingi la plej diversajn celojn. Ĉu tio estas problemo ?

Certe ne. Kontraŭe. Tio signifas, ke Esperanto fariĝas vera lingvo... Esperanto vivas. ... Do, ek, anoj de la plej inteligenta popolo!” (2006/1, p.3)

3. Multe malpli optimisma, sed tamen tre pasia kaj celo-orientita sonas tio, kion oni aŭdas kaj legas de Renato Corsetti. En Heroldo de Esperanto (17:2006, dua decembra eldono, p.2) li skribas: “... la problemo de la nuna movado ... estas objektiva: ĝi ŝuldiĝas al la ekapero de monda imperio, kiu havas sian lingvon kaj tre efike disvastigas ĝin. Fronte al tiu problemo, kiun Zamenhof eĉ ne antaŭvidis, ni sentas nin senhelpaj.” Corsetti neniel volas akcepti, ke nia reago al tia senkuraĝiga situacio ekzistu en tio, ke ni retiriĝas kaj kreas propran neston kaj nur zorgas pri niaj propraj aferoj. Ni ja kontraŭe “estas malgranda grupo de idealistoj, kiuj provas enkonduki revolucion novaĵon, sed la mondo ĉirkaŭ ni ne volas aŭdi ĝin...”. Kaj li kontinuas: “Mi provis ĝisnaŭze revenigi al la idealo de Zamenhof, kiu estis multe pli granda viziulo kaj multe pli danĝera revoluciulo ol ni nun.”

Ankaŭ dum la pasinta kongreso en Braunschweig li akcentis tiun rilatecon al Zamenhof kaj al ties celoj. Zamenhof, Corsetti diris, estis homo, kiu interesiĝis pri homoj, kiuj interbatalis kaj vivis en ŝajne nesolveblaj konfliktoj. Li volis malebligi konfliktojn kaj militojn, transformi la mondon al paco. Li ne nur volis ebligi senkoston vojaĝon per la pasporta servo aŭ trovi edzan partneron aŭ krei literaturon.

Laŭ Corsetti en Eŭropo la Esperanto-movado estas matura, stabila, regula. Ĉio sur bone ordigitaj vojoj, ĉiam ripetiĝas la samo. Tamen – Corsetti kvazaŭ konfesas – ankaŭ en Eŭropo ni havus ŝancojn, se ni denove eliras el la ideoj de Zamenhof, ĉar ekestas en Eŭropo ĉiam pli da problemoj kaj konfliktoj. Sed mankas ĉe ni nova sango, junaj, novaj ideoj. – (Tiun ĉi por mi tre surprizan kaj pasian rezonadon de Renato Corsetti mi stenografie savis por mia propra rezonado kaj memoro.)

Werner Pfennig, Alfred Schubert, Renato Corsetti – tute ne unusona, harmonia voĉo el Esperantujo. Oni do povas diri: ni troviĝas en kriza situacio. Krizo estas tempo, kiu invitas al demandoj. Estas tempo, kiu permesas eĉ dubojn ankaŭ pri tiuj ĝis nun netuŝeblaj principoj kaj pensmanieroj, kiuj formas firmajn brikojn en nia Esperantuja identeco kaj memprezentado al la mondo. Vera kresko de ekkono nur estas ebla, se oni riskas fari paŝojn en nekonatan, nefamiliaran regionon. Sed kio povus esti tiu ĉi nova tereno, al kiu Corsetti nin invitas kaj volas puŝi nin? Kien rigardi kaj iri?

*„En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa, kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur al korto, chio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj k.t.p.” (eltiro el privata letero al s-ro B. (N.Borovko) Originala verkaro. Joh. Dietterle. Leipzig 1929, p. 418)*

## Sed espero kreskas

Zamenhof en sia tempo povis eliri de la impresoj, ke la konfliktoj inter la homoj de lia urbo elkreskis el la malkapableco, interkompreniĝi per reciproke konata lingvo. Kaj pro tio li konvinkiĝis, mi citas: “ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa, kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj.”

Sed lia profunda orientiĝo kaj motivo estis tiu de idealisto: nome lia konvinko, ke ĉiuj homoj estas gefratoj kaj ke la tasko estas, forigi malamon kaj maljustecon inter la popoloj kaj vivi en tia maniero, ke la homaro sin komprenas kaj sentas kiel familion. Tio estis lia idealo kaj celo.

Se ni volas firme teni tiun ĉi celon kaj idealon, al kiu Renato Corsetti strebas revenigi nin, tiukaze ni devus ekkoni kaj agnoski, ke multe pli da homoj partoprenas en tiu celo, ol ni eble ĝis nun volis vidi kaj akcepti. Tiu ideala afero, de kiu la koro de Zamenhof estis plenplena, hodiaŭ estas realigata laŭ 1000 kaj pli da vojoj. Se ni ĉirkaŭrigardas, ni povas observi, kiom da homoj en tiom da projektoj kaj institucioj klopodas, realigi iun faceton de la ampleksa idealo. Per la celo kaj ties multaj konkretigeblaj aspektoj ni estas interligitaj kun vere tre multaj homoj, kiuj estas niaj veraj “samideanoj”. Eble en la agnosko de tia vasta kaj sinergia kunlaboro povus esti io nova por ni.

Tio ankaŭ signifas, ke nia decido por nia celo ne donas al ni iun ajn superecon. Ni nek estas “unika”, nek “la plej inteligenta popolo”, kaj cetere dubebla restas, ĉu ni disponas pri la sola plej inteligenta solvo. Ni pretervidus ke ni estas konfrontita al tre kompleksa socia, politika, morala problemaro, al kiu simplaj solvoj ne taŭgas.

Sed espero kreskas, ĉar kelkaj Esperanto-asocietoj jam komprenas tion. Ili serĉas la kunlaboradon kun la “eksteraj samideanoj”.

Mi montros al vi tri ekzemplojn tiajn.

1. En Ea 2006/2 Alfred Schubert raportas pri la komuna printempa kunveno de la landaj Esperanto-Asocioj de Bayern kaj Baden-Württemberg komence de 2006 en Neu-Ulm. Celo de la kunveno, organizita de Alois Eder kaj lia teamo, estis, “elkonduki Esperanton el la mem elektita izoliteco”. La titolo de la raporto: “Heraus aus der Isolation. Tagung geht neue Wege.” (Ni eliru el nia izoliteco. Kunveno iras novajn vojojn.“ Oni volis atingi tiun celon per invito al multaj organizaĵoj en la urbo Ulm, partopreni en t.n. “Markt der Möglichkeiten” (Foiro de eblecoj kaj ŝancoj). Ili montru siajn proprajn vojojn al la komuna celo: La engaĝiĝo por la gardado de la homaj rajtoj. Tiel Alfred Schubert resumas.

2. Alia kuraĝiga ekzemplo estis la partopreno de la Hamburga Esperanto-grupo je la “Festivalo de Kulturoj” en septembro 2006 sur la universitata studkampo. La temo de tiu ĉi festivalo estis “Respekto kiel bazo por komuna kunvivado”. Parto de la evento estis, ke granda karavano marŝis kaj dancis tra la urbo. Resume Jürgen Wulff konstatas: Entute granda sukceso por paca kunvivado de la kulturoj kaj ankaŭ sukceso por la informlaboro de la grupo. (Ea 2006/5, p.8)

3. Tria bona ekzemplo. Ea 2006/6 raportas pri unuafoja partopreno de la svisa Esperanto-organizo en la plej granda ĉiujara nacia foiro “Comptoir Suisse” en Lausanne. La ĉijara temo estis “Daŭropova evoluo – la futuro de la planedo”. Kaj la asocio havis la ŝancon, prezenti sin en la speciala ekspozicio de la foiro, kiu temis pri komunikado kaj montri sian apartan kontribuon al la temo. Kaj Stefano Keller tre kontente raportas: “Tiel, ni ricevis la viziton de la bonaj personoj, tiuj kiuj estas mense malfermitaj kaj serioze interesiĝas pri la hodiaŭaj problemoj influantaj nian tre proksiman futuron.” (p.12)

Do tri kuraĝigaj ekzemploj, certe ne la solaj en nia komunumo. En tiaj eventoj de kunlaboro montriĝas salutinda aspekto de la futuro de nia agado: esti parto de la tre variaj klopodoj multlokaj por konservado aŭ kreo de vivofavora medio kaj por la konstruo de mondo tiom paca kaj justa por ĉiuj homoj kiom eblas. Tie nia futuro.

## La lingvo Esperanto – en kia rolo?

Alia demando mia celas al la rolo, kiun la lingvo Esperanto povas ludi por la realigo de tiu multavoje konkretigebla celo. Unue mi volas demandi el la pozicio de la Esperantista komunumo, do pri nia interna komunikado rilate al la lingvo Esperanto.

1.

Esperanto sendube estas genia verko. Ni ĉiuj estas certaj pri tio. Ni ne bezonadas ĉiam denove novajn pruvojn por tio.

Tamen mi prezentos aldonan agnoskon : Prof. Rainer Arntz, ĉefo de la instituto por aplikata lingvoscienco de la universtito Hildesheim, regas ĉirkaŭ 10 lingvojn. Se oni volas inciti entuziasmon en lia koro, sufiĉas doni al li la temon “Esperanto”. Mi memoras, ke li diris: “Oni ne povus konstrui kaj krei ion pli bonan.” (rilate al planlingvo, memkompreneble!)

Esperanto estas relative facile lernebla komunikilo. Ĝi ebligas pli rapidan kaj egalrajtan alproksimiĝon inter homoj, kiuj sen ĝi pro la barilo de la malfacile akireblaj etnaj lingvoj ne trovus reciprokan kontakton. Do granda avantaĝo – se temas pri perlingva interkompreniĝo.

2.

Plua tre grava funkcio de la lingvo Esperanto ŝajnas esti en tio: La decido por tiu ĉi aparta lingvo permesas kaj faciligas konkrete senteban komunan identecon, pli facilan ol venus kaj fluus el la multe pli abstrakta komuna celo. La esperoj kaj emocioj, kiuj propre estas nutrataj de la celo en la fono, estas metataj sur la ilon, kiun Zamenhof kreis por realigo de tiu ĉi celo. Lingvo en tia rolo ligas la emociojn kaj tiamaniere ebligas al la Esperantistoj, senti sin kiel anoj de valora ideo. En tiu ĉi funkcio la lingvo liveras la lojalecon, necesan por la pluvivo de ĉiu grupo. Sen tia konkreta identigilo minacas la perdo de komuneco, disiĝo.

3.

Tamen ni atente observu, kien tiu ĉi dinamiko povas konduki nin.

En la libro de Boris Kolker “Vojaĝo en Esperanto-Lando » (Rotterdam 2002) oni trovas sur paĝo 58 kvazaŭ himnan tekston de Nadja Andrianova sub la titolo “*Glorkanto al Esperanto*”:

“Ho, mia kara lingvo Esperanto,  
miraklo vera kaj neripetebla,  
ŝlosil’ magia, kiu malfermadas  
ĉe ĉiuj landoj, kontinentoj pordojn,  
kaj same – de la bonaj homoj korojn.  
Ho, kara nobla lingvo Esperanto,...  
Ĝis lasta spiro kun fervoro  
mi gloros, benos vin  
el tuta mia koro...”

Ankaŭ Claude Piron kontribuis al tiu ĉi libro (p.33). La titolo de lia kontribuo:

“*Mi kredas je la bono. Mi kredas je Esperanto.*”

Kaj tie li skribas konfesante: “Mi kredas, ke ĝi povas forigi multajn suferojn, pri kiuj homoj ne konscias, kaj kiuj estas ligitaj al la manko de interkomprenilo..

Ĝi (Esperanto) naskiĝis el la boneco de unu homo. ... Jes, ĝi (la lingvo Esperanto) estas bona.”

Du ekzemploj por admiro, kiun oni taŭge nur povus priskribi, se oni uzas teologiajn kategoriojn kaj terminojn. La lingvo, kreita de kiom ajn bona homo –, ricevas sakramentan karakteron, kvazaŭ ĝi efikus per si mem garantiante benoplenajn rezultojn.

Mallonga rigardo por ekzemplo en la historion de la mesaĝo de Jesuo Kristo povus helpi, ne forgesi, kian sorton povas havi bona donaco, kiun bona homo metis en la ne nur bonajn manojn de ni homoj. Kaj same ankaŭ tiu bona ilo Esperanto povas kaj povos esti uzata por ĉio tio, kion ni homoj estas kapablaj fari.

4.

Kaj plua observo apartenas en tiun ĉi kadron:

En nia ĉiutaga interna komunikado en Esperantujo ni ofte uzas la vorton “Esperanto” en la rolo de metafora esprimo por io, kio propre estu priskribata kiel intenco kaj agado de ni homoj. Mi donos kelkajn ekzemplojn:

⇒ Mi legis “Dum suna frusomera vetero estis multaj interesaj konversacioj kaj ofte subteno de la vizitantoj por la celoj de Esperanto.” (Ea 2006/5, p.8) Demando mia: ĉu la lingvo Esperanto povas havi celojn en si mem? Kial la homoj tie ne parolas pri siaj propraj celoj, kiujn ili volas atingi pere de Esperanto?

⇒ Mi trovis jenon: “La celo de la kunveno estis, konduki Esperanton el la mem elektita izoliteco.” (Ea 2006/2, p. 17) – Mi demandas: Kiu sentas sin en izolita pozicio? La lingvo Esperanto? Certe ne, sed homoj, kiuj laboras por celo uzante la lingvon Esperanto.

⇒ Ankaŭ tion mi legis: “Kiun vojon Esperanto iros en la estonteco? (Ea 2006/2, p.11) Kiu iras la vojon? La lingvo? Mi pensas, ke estas homoj, kiuj iras sian vojon.

⇒ Aŭdu tion: “Ĉu Esperanto atingis sian finon – Ist Esperanto am Ende?” (p.11) – aŭ eble nur niaj ĝis nun firme tenataj konvinkoj pri tio, kion ni Esperantistoj povas efiki kaj atingi per la lingvo Esperanto en tiu ĉi mondo.

⇒ Kaj finfine tion: “Esperanto ne plu ekzistas kiel movado.” (Ea 2006/2, p.3) Ĉu ĝi vere iam ekzistis kiel movado?

La sociologia fako, kiu okupiĝas pri tiaj fenomenoj, nomas tiun ĉi lingvouzon: “Verdinglichung” – “objektigo” en speciala senso (vidu en PIV sub “objekto”, dua senso): Tio signifas, ke ni konceptas kaj traktas “produkton de homo kvazaŭ ĝi estus io alia ol homa produkto” (Berger/Luckmann, p.95). En niaj lingvaĵoj Esperanto ja ofte ne plu estas traktata kiel homa produkto, sed kiel io kvazaŭ veninta kaj donacita de ekstere, kvazaŭ ĝi ne estus farita de homo kaj lernita, parolita, privarbita, uzita por celoj de homoj. Ĝi aperas kvazaŭ ĝi havus memecon, estus sendependa estaĵo, kiu mem havas celojn, troviĝas en malagrabra situacio, iras sian vojon, havas propran sorton, eble atingos finon aŭ “vivu por ĉiam” (novjara saluto al mi).

Ŝajnas aŭ eĉ fakte, ke Esperanto por ni Esperantistoj estas pli ol nura lingvo. Ŝajnas, ke ĝi posedas propran efikotaŭgan forton kaj per si mem povas garantii bonajn rezultojn. Nia interna komunikado, sed ankaŭ niaj varbaj agadoj eksteren spegulas kaj nutras tiun ĉi konvinkon.

Do, pro la maniero laŭ kiu ni parolas pri ni mem kaj Esperanto, ŝajnas esti tre urĝe, tiri utilon el esploroj, kiuj ne kreskis interne de nia komunumo sed ekstere de ĝi en sciencaj fakoj, kiuj okupiĝas pri la temo de interkultura komunikado kaj

ĉirilataj temoj. Eble ni ja pretervidas faktojn, al kiuj ni nepre devus doni nian atenton.

La demando do estas: ĉu oni ie disponas pri spertoj kaj ekkonoj, kiuj povus helpi al ni, meti la priskribon de nia tasko kaj de niaj esperoj sur pli taŭgan, fidindan – ankaŭ por aliaj homoj pli konvinkan bazon? Ĉu ni eble troŝarĝas la lingvon Esperanto per tro altigitaj atendoj, al kiuj ĝi tute ne povas konformi? Ĉu ni plivastigu nian perspektivon studante tiajn esplorojn? Ĉu tie eble atendas nin io nova, je kio ne nur Renato Corsetti sopiras?

## Lingvo kaj kontakto – ĉu iu ajn garantio?

La rezulto de esploroj en la tereno de interkulturaj komunikado, renkontiĝoj kaj kunlaboro estas tre unusence klara: nek uzado de lingvo per si mem, nek eĉ kontakto per si mem garantias, ke interkultura lernado okazas, ke oni akiras interkulturan kompetenton, ke evoluas konscio de mondvasta interkompreniĝo kaj interligiteco, ke rezultas alproksimiĝo al la renkontita fremdeco. (Vi eble rimarkis, ke mi citis kelkajn celrilatajn erojn el niaj statutoj).

Disponi pri komuna lingvo kaj fari kontaktojn certe estas necesaj bazaj kondiĉoj por la ĵus cititaj celoj, sed: ili garantias nenion. Do, ankaŭ Esperanto estas nura ŝanco kaj bazo, sed ĝi garantias nenion plu. Tiuj ĉi celoj niaj bezonas ion aldonan por esti realigataj. Ne ekzistas mallongigo.

Historio kaj nuntempo nepretervideble instruas, ke uzo de komuna lingvo ne rezultas en interkompreniĝo, nek en nia ĉiutaga vivo, nek en la internaciaj rilatoj. Kaj la samo validas ankaŭ por la internaj rilatoj en la Esperantista komunumo. Nur atentu la konflikton inter la homoj, kiuj reprezentas UEA kaj la homoj, kiuj reprezentas la asocion Esperanta Civito. La historiistoj inter ni povus provizi nin certe kun multaj konfirmantaj ekzemploj. Do, ankaŭ la lingvo Esperanto ne per si mem plivastigas nian komunikadan kompetenton, kaj certe ne nian interkulturan.

Kial – malgraŭ tiaj ne tre esperigaj spertoj – kial do ni plutenas tiom da rezisto, akcepti, ke ni devas aldoni ion pluan al tio, kion ni jam faras? Mi renkontis jenon:

La filozofo *Immanuel Kant* diris: “La stato de paco inter la homoj ne estas natura, sed ĝi devas esti produktata.” (Immanuel Kant 1724-1804 “Pri la paco”).

Kaj de *Ken Wilber*, filozofo en nia tempo, kelkaj nomas lin “Albert Einstein de la esploro pri konscio” – de li ni aŭdas ion saman: “La tutmonda (global) perspektivo ne estas ennaskita (natura) al ni. Ni ne venas en tiun ĉi mondon kune kun ĝi. Ankaŭ la plej fruaj homoj (Hominiden) ne estis ekipitaj per ĝi. ...Tutmonda perspektivo estas malofta, elita, eksterordinara perspektivo de granda profundeco, kaj ne estas multaj homoj, kiuj vere atingas tiun profundecon.” (Ken Wilber, p.207) Mi estas certa, ke Zamenhof apartenis al tiuj malmultaj homoj.

Eble povus iomete helpi, pripensi rilate al Esperanto ankaŭ tion, kion Ken Wilber diras pri la disvastiĝo kaj uzado de la interreto. Pri la interreto oni diras, ke ĝi estas tutmondeca, kaj pro tio ankaŭ la konscio kiu uzadas ĝin, estas tutmondeca. La reago de Wilber: “But that’s not true at all!” “Sed tio entute ne estas vera!” (Ken Wilber, p. 391) “La komputera tekniko nur estas teknologia bazo, kiu povas subteni la mondcentritan perspektivon, povas subteni la tutmondan konscion, sed ĝi tute ne garantias tion.” (Ken Wilber, p. 391)

Same ankaŭ pri la lingvo Esperanto oni povus (aŭ eĉ devas) diri, ke ĝi estas mensa ilo kaj helpa strukturo, “kiu – *laŭ Wilber* - ne jam per si mem garantias internajn ŝanĝiĝojn, por ne paroli pri tutmonda konscio.” (Ken Wilber, p. 391)

Do sur la vojo al nia celo, kiel ni priskribas ĝin en niaj statutoj kaj tenas ĝin en niaj koroj, atendas nin "internaj ŝanĝiĝoj". Io aldona al tio, kion ni jam faradas, estas postulata de ni.

## Interkultura kompetento – malfacila tasko

Ekzistas kelkaj kaŭzoj, kiuj povus senkulpiĝi nin, sed kiuj samtempe montras al ni la malfacilecon de la tasko, kiu atendas nin. Unua kaŭzo povus esti en tio, ke ni tute ne dependas de la sukceso de niaj interkulturaj kontaktoj. Ĉu niaj kontaktoj estas daŭrantaj aŭ ne, ĉu ni akordas aŭ ne, tio ne vere gravas. Ni ne bezonas tian sukceson por pluvivado, ni ne dependas de sukcesoplenaj ekonomiaj kaj politikaj interrilatoj. Ni ne partoprenas en la solvado de inter-etnaj, inter-religiaj kaj politikaj konfliktoj. Ni ne helpas akordigi rivalantajn konceptojn pri homaj valoroj. Pro tio nenio premas nin, priatenti kaj esplori, kiel kaj kiom interkulturaj diferencoj influas la rezultojn de kontaktoj kaj interkommunikado. Ne estas natura tasko por ni.

Sed la alta pretendo, kiu estas ligita al la celo de Zamenhof, bezonas ekspertojn sur tiu ĉi tereno, kaj ni disĉiploj de Zamenhof propre devus esti tiuj ĉi ekspertoj. Sed ŝajnas, ke ni trovas tiujn ekspertojn nur tie, kie kompetenta agado en interkulturaj rilatoj estas nepre kondiĉo por sukcesa internacia kunlaborado kaj kie la esploro de la kaŭzoj de malfacilaĵoj in tiaj interrilatoj estas urĝa tasko.

*Jürgen Beneke*, emerita profesoro kaj multjara estro de la esplora instituto por interkultura komunikado de la universitato Hildesheim estas eminenta, elstara eksperto en tiu nia problema tereno.

Li povus iomete konsoli nin: en teksto lia kun la titolo “interkultura agadkompetento – hodiaŭ pli necesa ol iam ajn antaŭe” – ni povas legi: “Dum longa tempo oni aŭ tute neis aŭ bagateligis, ke problemoj en la internacia kunlaborado havas kulturajn kaŭzojn. Oni diris, ke tiu, kiu estas fakulo en sia laborkampo kaj kiu aldone estas iomete sensiva rilate al interhomaj kontaktoj kaj kiu estas tolerema, ke tia homo estus sufiĉe ekipita por sukcesa agado sur internacia kampo. Sed oni devis ekkoni, ke tiaj kvalitoj ja estas nepraj, tamen ili ne sufiĉas. Oni devas aldoni konsiderindan kvanton da scio kaj kapabloj, por atingi sukcesan agadon.” (Jürgen Beneke, p. 93f.)

Kaj ni devas ankaŭ atenti, ke Beneke konstatas: “La nura kontakto kun aliaj kulturoj ne aŭtomate rezultas en plibonigo de la komunikado. Oni dum jaroj povas malbone interkomuniki kaj ne rimarki tion. El tio sekvas, ke necesas konscia klopodo, kiu ampleksas scion, evoluigon de la konscio kaj rezonadon por atingi plibonigon.” (Jürgen Beneke, 93f.) Se ni akceptas tiujn ekkonojn, ni ne plu povas kredi, ke per la lingvo Esperanto (mi citas) “ni estas ekipitaj al la plej rekta interkultura komunikado” (Femina 1, p.4). Plu tenante tiun ĉi kredon, ni simple nur trompus nin mem.

Ni renkontas pluan malfacilaĵon, kiun Jürgen Beneke jam menciis kaj kiu karakterizas ankaŭ la kontaktadon pere de Esperanto. La kontaktoj dum niaj kongresoj, seminarioj kaj rondvojaĝoj de unuopaj Esperantistoj el foraj landoj – tiuj kontaktoj havas nur mallongan daŭron kaj pro tio Interkulturaj diferencoj kaj

tiurilataj malakordoj ne havas ŝancon esti rimarkataj. Denove *Jürgen Beneke*: “Ĉi tiuj interkulturaj diferencoj ĝenerale estas rimarkeblaj nur post pli longa tempodaŭro, nur tiam, kiam la eŭforiaj atendoj de la “miela tempo” cedis al la seniluziigoj, kiuj rezultas el la ĉiutagaj konfliktetoj. Tiukaze la klimato de la kunlaboro rapide povas malboniĝi en tia grado, ke la projekto devas fiaski.” (Jürgen Beneke, p. 91) Sed ankaŭ tiuĉikaze la kaŭzoj por la fiasko ofte restas kaŝitaj. La fiasko ofte estas atribuata al personaj deficitoj de la alia flanko aŭ al banalaj lingvaj miskompreniĝoj. “Kulturaj kaŭzoj nur malofte estas supozataj, nek por la konduto de la aliulo nek por la propra konduto.” (Jürgen Beneke, p. 97)

“En la ekonomia tereno cirkulas taksokalkulo, laŭ kiu 60 ĝis 70 procentoj el ĉiuj internaciaj «Joint Ventures» fiaskas pro interkulturaj malakordoj.” (Jürgen Beneke, p. 91)

## Stilo de komunikado – la vera “kulpanto”

Kaj estas tria senkulpiga malfacilaĵo, kiu estas komuna al ĉiuj, ne nur al ni Esperanto-amikoj. Kontraŭe al la konvinko de Zamenhof – li ankoraŭ ne povis scii tion - oni nun povas scii, ke la problemoj ne tiom rezultas el la diverseco de la lingvoj, sed el la diverseco de la ne akordantaj kulture formitaj “stiloj de komunikado”. Tiuj niaj komunikadaj stiloj apartenas al la ne konsciataj memkompreneblaĵoj de nia vivo. Tamen diferencoj en la stiloj estas multe pli gravaj kaj influrikaj por la rezulto de la interŝanĝo kaj de la kunlaboro ol la problemoj de la nur lingva interkompreniĝo. La ĉiutaga vivo nia estas plena de aŭtomatigitaj, do ne plu konsciaj kondukataj trajtoj, kiuj tamen formas la bazon de nia memkonscio kaj sento de identeco.

*Jürgen Beneke* kolektis amason da ekzemploj de tiuj kulturaj dimensioj, en kiuj homoj el diversaj kulturoj povas diferenci. Mi citos nur kelkajn el ili: Jam dum la komenca intersalutado: Ĉu doni manon aŭ ne? Ĉu diri aŭ demandi la nomon kaj eĉ la profesion aŭ ne? Ĉu tuj transdoni la donaceton aŭ ne? Kiel reagi al ricevita donaco? “La sencon de la donacado oni nur povas ekkoni el la kulturinterna perspektivo mem – se entute.” (Jürgen Beneke, p. 99)

Mi trovis konkretan ekzemplon por tio en libro de *Galsan Tschinag*. Li estas estro de la tribo de la Tuvinoj, nomada popolo en centra Azio ĉe la piedoj de la montaro Altajo. Tschinag estas intertempe ankaŭ fama verkisto kaj poeto kaj skribas en germana lingvo, ĉar oni estis sendinta lin por studado al Leipzig. Tial li sentas sin hejmece en du kulturoj. Mi citas: “Ĉe la Tuvinoj oni ne donacas nur unusolan objekton. Se vi volas doni al mi kudrilon, vi aldonas herbotigon.” (Galsan Tschinag, p. 210).

Aŭ dum la manĝado: Ĉu diri 'Bonan apetiton!' aŭ ne? Ĉu babili aŭ silenti? Dum interparolado: Ĉu daŭre teni kontakton de okulo al okulo? Ĉu estas afable multon rakonti pri si mem aŭ tute ne? Ĉu uzi la vorteton 'ne' estas permesata aŭ ĉu ĝi kontraŭe estas spertata kiel netolerebla malafableco? Kiel lingve formuli 'inviton'; kiel ekkoni ĉu 'invito' estas vera invito aŭ nur rita fino de la interparolado? Kiel oni dum interparolado ŝanĝas la rolon de parolantoj? Ĉu oni rajtas interrompi aŭ ne? Denove *Galsan Tschinag* al sia partnerino en intervjuo: “Mi rakontas al vi ĉion, kion mi volas diri al vi. Kaj ne interrompu min, ĉar interrompi nomadon en lia parolada fluo signifas, ke vi volas subigi lin, limigi lin, strangoli lin.” (Galsan Tschinag, p. 7). Lia libro “En la lando de la kolera ventoj / Im Land der zornigen Winde” estu deviga legaĵo por lernantoj pri interkulturaj diferencoj kaj fenomenoj.

**Resume:** Ni devas akcepti, ke ne ekzistas t.n. “normala konduto“ , kiu validas ĉie en la mondo. Kaj eĉ pli: ni tute ne devas atendi de homoj en aliaj kulturoj tion, kio por ni estas niaj “memkompreneblaĵoj”. Iliaj “normalaĵoj” same kiel la niaj dependas de niaj reciprokaj kulturoj.

“Jes, ekzistas kelkaj kondukataj eroj, kiuj povas esti rigardataj kiel ĝenerale humanaj, sed ili estas multe pli maloftaj kaj pli malvaste validantaj, ol ni tre ofte supozas... kaj ili ne estas tiom konkretaj kaj specifaj, ke ili povus sufiĉi por pli ampleksa komunikado.” (Wolfgang Christian Schneider, p. 52)

## Neŭtraleco ne eblas

Forta malfacilaĵo por ni Esperanto-amikoj, akcepti la ekkonojn de la eksteraj ekspertoj, ŝajnas fondi el tio, ke ni komprenas kaj rigardas nin gardantoj de ĉies kultura identeco. Prenu jenon: *Nicolino Rossi*, direktoro de la Esperanto-katedro en Neapel / Napoli, diris: “Fakte Esperanto taŭge garantias kaj protekton kaj egalrajtecon al ĉiu lingvo kaj kulturo.” (HdE 2:2007, p.2) Aŭ jenon, kion mi povis legi en protesta letero al kanceliero Helmut Kohl(1995): “Esperanto estas la sinonimo por neŭtrala kaj egalrajta multakultura integriĝo”.

Ni tre volonte montras al la “neŭtraleco” de la lingvo Esperanto. Esperanto garantias neŭtralajn interrilatojn, ni diras. Sed tiu ĉi aserto kaj kredo konflikta kun la fakto, ke la parolantoj mem neniam povas esti neŭtralaj. Nek nia pensado, nek nia intenco, nek nia parolado, nek nia komprenado povas esti neŭtralaj. Ni ne povas kontesti kaj kaŝi niajn kulturajn devenojn kaj lokojn. Konscio neniam estas neŭtrala, ĝi ĉiukaze estas formita de geografio, historio, mondkonceptoj, religiaj konvinkoj ktp. Kiam ni eniras renkontiĝon, ni portas en nia dorsosako (kaposako) niajn kredojn, niajn konvinkojn, nian ĉiurilatan devenon. Neniu bonvola intenco povas liberigi nin de ĉio tio.

“Ni ne povas fuĝi el la propra kulturo, same kiel ni ne povas fuĝi el nia propra korpo kaj el nia propra lingvo.” (Bernhard Waldenfels, p. 109)

Ĉio, kion ni montras kaj vivas en nia ĉiutaga komunikado, tion ni ankaŭ montras kaj vivas, kiam ni parolas Esperanton. Ni restas rusoj, francoj, germanoj, serboj ktp. La franco Theodore Zeldine raportas: “Mi pensis, ke mi estas homo, sed nur kiam mi iris al Usono mi subite estis la franco.”

## La startopunkto: ni mem

El ĉio tio tute logike rezultas plua ne facila tasko, pri kiu regas interkonsento inter tiuj, kiuj laboras en tiu ĉi tereno. La alproksimiĝo al interkultura kompetento komenciĝas ĉe ni mem, en nia propra domo - precipe do pro tio, ĉar nia ligiteco al nia kulturo estas por ni tiom memkomprenebla, ke ni nur malfacile povas ekkoni ĝin kaj ekkonsciiĝi pri tiu ĉi fakto kaj ties sekvoj.

“... ni ne trompu nin pri tio, ke en tio, kio okazas inter la kulturoj, ĉiam ĉiufoje ankaŭ respeguliĝas io de tio, kio okazas inter la unuopuloj kaj kun la unuopuloj. Ne nur la fremdeco komenciĝas ĉe ni, sed ankaŭ la provoj venki ĝin komenciĝas en la propra domo.” (Bernhard Waldenfels, p. 109)

Ni estas produkto de tute aparta, definitiva kulturo kaj ni havas tute apartan manieron de komunikado. Kompreni tiun ĉi realaĵon kaj sperti ĝin en la interŝanĝo

kun la aliulo, tio vere ne estas facila tasko. Laŭ *Jürgen Beneke*: “La kapablo, percepti sin mem el distanco, nur malfacile estas akirebla, kvankam ĝi estas nepra kondiĉo por fruktodonaj interkulturaj kontaktoj.” (Jürgen Beneke, p. 97)

En sia esploro ĉe la universitato de Hildesheim Jürgen Beneke evoluigis “Profilon de Interkultura Kompetento”. La unuaj tri paŝoj en tiu ĉi profila programo precize celas al tiu ĵus menciita nerezignebla kapablo, krei en si mem la antaŭkondiĉojn por renkontiĝo kun la aliulo, kun la fremdulo.

Unua paŝo: Plej unue mi devas lerni, percepti min mem kiel produkton de mia kulturo kaj socialiĝo.

Dua paŝo: Mi devas evoluigi la kapablon, ekkonsciiĝi pri miaj valoroj kaj konvinkoj.

Tria paŝo: Mi devas lerni taksu min mem realece, tio signifas, ke mi devas atingi akordon inter la bildo, kiun mi havas de mi mem kaj kiun havas aliuloj de mi. Tio nur estas ebla, se mi estas preta, vidi min tra la okuloj de la aliuloj.

Resume mi donos nur kelkajn pluajn celojn tiu ĉi profilo: iĝi kapabla, agi en diversaj roloj, - eviti tro rapidajn klarigojn kaj atribuojn de kulpo en konfliktoj, - esti kapabla al empatio, t.o. la kapablo, kunsenti kun la aliulo kaj vidi lian mondon kvazaŭ per ties okuloj, - kaj - aparte grave - akiri toleremon rilate al ambigueco, t.e. la kapablo toleri diferencajn kulturajn normojn, eĉ aŭ ĝuste se ili ne akordas kun la niaj. Kaj krome: energiplena motivado kaj scioj.

La baza kompetento, kiu portas ĉiujn tiujn kapablojn, estas la preteco al sincera, malfermita, kunsentema aŭskultado. Oni diras kaj verŝajne ankaŭ vi sufiĉe spertis, ke tiu ĉi kapablo en nia ĉiutaga **intra**kultura komunikado ne ofte estas trovebla. Ĉar la reagoj en nia komunikado plej ofte venas el jam pretaj taksado, antaŭjuĝoj, firmaj konvinkoj. La respondo jam kuŝas sur nia lango: “Tio ne estas ĝusta!”, “Ho, vere vi malpravas!”, “Tio estas malprudente!”, “Kiel homo povas pensi tion!” Reagi en tia maniero estas tute normale.

Sed se **inter**kultura komunikado eniru en nian ĉiutagan vivon, niaj partneroj ne nur estos la samideanoj, la homoj de samaj opinioj, konvinkoj, kredoj, de sama komunikada stilo. Ni devas atendi, ke ni renkontos homojn, kiujn ni ne konas, kiuj estas veraj aliuloj kaj fremduloj por ni. Tiukaze la kapablo “aŭskulti” signifas, ke ni estas vere scivolemaj pri la atendeblaj diferencoj kaj ke ni povas toleri kaj elteni ilin. Krome: tio signifas, ke ni komence lasas la fremdulon esti fremda kaj ke ni povas elteni la eblan maltrankviliĝon. Plue: tio signifas, ke ni provas vidi la mondon de la aliulo kvazaŭ el liaj okuloj. La filozofo Martin Buber komentas tiun situacion jene: “Koncedi, ke la fremdeco estas fremda al ni, tio estas unu el la plej gravaj antaŭkondiĉoj por sukcesa interparolado.” (in: Jürgen Heckel, p.232).

Se ni ne volas aŭ ne povas elteni kaj toleri la maltrankviliĝon, kiun povas kaŭzi la renkontita fremdeco, la solvo povus esti en tio, ke ni simple pretervidas la aliecon de la aliulo. Ni reduktas kaj bridas la fremdecon, kaj tiel evitas, ke ĝi ĝenas nian mondkoncepton. Dum niaj kongresoj – porekzemple - ĝi rajtas prezenti sin en adaptita folkloro formo, kiu minimumigas la eblan maltrankviligon kaj ne ĝenas la atenditan agrablan etoson.

Aŭskultado en tia formo estas tre riska entrepreno. *Carl Rogers*, unu el la fondintoj de la Humanistische Psychologie (humaneca psikologio) avertas: “Aŭskulti estas danĝera, ĉar oni riskas esti ŝanĝita.” Kaj li akcentas, ke tio validas

kaj por la interpersona kaj por la internacia komunikado. Se mi vere malfermigas min por kompreni la fremdulon, tiukaze ja povus okazi, ke mi fine devas diri: “Ho, la konvinko de li /ŝi ja estas same aŭtentika kiel estas la mia! Kaj kio ĝis nun estis sankta kaj grava por mi, ne plu estas la sole ebla perspektivo, la realo entenas pli da eblaj aspektoj ol mi ĝis nun opiniis. Ŝajnas ke ekzistas alternativoj. Kaj eĉ Dio ŝajnas esti pli granda ol mi ĝis nun kredis.” Ktp.

Oni fakte bezonas konsiderindan kvanton da kuraĝo por elteni kaj toleri la maltrankviliĝon de la propra realo per la perceptita fremda realo. La kuraĝo al tia reciproka malfermiteco kaj lernemo nutras sin de la rajtigita atendo, ke interkultura renkontiĝo kreas kontentigan pozitivan realon kaj riĉigon por ambaŭ flankoj.

Se ni intencas sekvi la idealon de Zamenhof - kaj ne nur demandas, kiom Esperanto povas utili al ni - , tiukaze ni devus riski iri tiun ĉi vojon. Kaj eble la de ni pretendata ‘neŭtraleco’ atendas nin je la fino de tiu ĉi vojo. La necesa motivo por la elekto de tiu ĉi vojo ne devus esti fremda al ni, al ni, disĉiploj de Zamenhof, – ni ja disponas pri bona starta kapitalo.

## Kion mi volis diri

Finfine mi resumos por vi miajn provojn trovi respondon al la demando: “Kien kreski en Esperantujo?” (Aŭ en la versio de Renato Corsetti: “Kie ni povus trovi tion novan, kion ni bezonas?”)

Mi prezentis al vi tri proponojn:

1. Ni bezonas pli da vasteco. Tio signifas: Ni ekkonu tion, kion Zamenhof intencis realigi, ankaŭ en la multaj kaj diversaj projektoj, kiuj ĉie en la mondo sur diferencaj vojoj alstrebas la saman celon. Kaj ni serĉu kontaktojn al ili, por kune kaj sinergie labori por la celo. Mi donis al vi tri ekzemplojn.

2. Ni bezonas pli da profundeco. Tio signifas: Ni komprenu kaj alprenu komunikadan kaj interkulturan kompetenton kiel apartan taskon, kiu ankoraŭ atendas nin. Ni studu la rezultojn de tiurilataj sciencaj esploroj, kiuj troveblas – laŭ mia impresio – precipe ekster la limoj de nia nuna komunumo.

3. Ni bezonas pli da sobereco. Tio signifas: Ni klopodu priskribi nian specifan parton en tiu mond vasta komuna projekto, en kiu ni partoprenas, pli sincere kaj sobre ol ĝis nun. Ni dediĉu pli da atento al nia interna komunikado kaj al niaj eble tro troigitaj espero kaj promesoj. Ni evitu trompi nin mem.

Kvankam ni certe ne estas “la plej inteligenta popolo” (vi memoras, ke mi citis tiun aserton), tamen neniu - escepte de ni mem - povas malhelpi nin, agadi inteligente kaj ĉiam denove rezonadi pri tio, kion ni pensas, volas, diras kaj faras.

Mi esperas, ke mi povis doni al vi kelkajn impulsojn al propra pripensado de tiu ĉi temo – se ĝi estas aŭ estos ankaŭ la via.

Mi dankas vin pro via atento.

---

## Bibliografio:

1. Beneke, Jürgen / Jarman, Francis (Hrsg.): Interkulturalität in Wissenschaft und Praxis. Hildesheimer Universitätschriften; 15), Hildesheim 2005.
2. Beneke, Jürgen: *Hard facts* und *soft skills*: Globalisierung der Kommunikation. In: Jürgen Beneke, Francis Jarmann (Hrsg.): Interkulturalität ... S. 89 -111.

3. Berger, Peter L. / Luckmann, Thomas: Die gesellschaftliche Konstruktion der Wirklichkeit. Eine Theorie der Wissenssoziologie. Frankfurt 1977.
4. Heckel, Jürgen: Basiskompetenzen – Hilfreiches Zuhören und Konfrontation. In: Volker Bernius u.a. (Hrsg.): Der Aufstand des Ohrs – die neue Lust am Hören. Readers Neues Funkkolleg. Göttingen 2006. S. 228 – 242.
5. Kolker, Boris: Vojaĝo en Esperanto-Lando. Rotterdam 2002.
6. Schenk, Amélie / Tschinag, Galsan: Im Land der zornigen Winde. Zürich 1999.
7. Schneider, Wolfgang Christian: Zur Notwendigkeit historischer Kompetenz für die Interkulturelle Kommunikation. In: Beneke, Jürgen / Jarman, Francis (Hrsg.): Interkulturalität ...
8. Waldenfels, Bernhard: Grundmotive einer Phänomenologie des Fremden. Frankfurt 2006.
9. Wilber, Ken: Eine kurze Geschichte des Kosmos. Frankfurt 2000/4
10. Zeldine, Theodore: Die Kunst zu sich selbst aufzublicken. Französische Innenansichten. Hamburg 1987.
- 
11. Bar-On, Dan: Die „Anderen“ in uns. Dialog als Modell der interkulturellen Konfliktbewältigung. Hamburg 2006.
12. Rosenberg, Marshall B.: Gewaltfreie Kommunikation. Aufrichtig und einfühlsam miteinander sprechen. Neue Wege in der Mediation und im Umgang mit Konflikten. Paderborn 2003.
13. Sacks, Jonathan: Wie wir den Krieg der Kulturen noch vermeiden können (The Dignity of Difference. How to avoid the Clash of Civilizations.). München 2007.

---

### Rekomendo:

Seminar im Tagungszentrum „Internationales Haus Sonnenberg“:  
**„Umgang mit Fremdem – Interkulturelle Kommunikation“**  
18.08. – 25.8.2007

Tagungsleitung: Dr. Jan Capek, Pardubice/CZ; Dr. Jan King, London/GB

Tagungssprachen: Deutsch und Englisch (simultan gedolmetscht)

Tagungspreis: 310,- €

„Wir leben in Gesellschaften, die mehr und mehr multikulturell geworden sind. Das bedeutet eine Vielfalt neuer Erfahrungsmöglichkeiten, das bedeutet Ängste vor dem Fremdem oder auch vor den Fremden. Was gibt es an Bereicherungen, was gibt es an Problemen? Welches ist der gesetzlich-rechtliche Rahmen für diese veränderten gesellschaftlichen Bedingungen? Wie schaffen wir es, ein positives Miteinander zu leben?“

„Internationales Haus Sonnenberg“

Clausthaler Straße 11 ~ D-37444 St. Andreasberg

Fon: 05582-9440 [www.sonnenberg-international.de](http://www.sonnenberg-international.de)